


Esperanto en servo de la monda paco



P A C O


Oficiala organo de Mondpaca Esperantista Movado (MEM)

Bonĉo
Obreškov
PATRINO



5
—
81

La sciencistoj protestas kaj avertas



Akademiano
Kiril Bratanov
vicprezidanto
de la Monda
Federacio
de Sciencaj
Laboristoj.

Sur la monda firmamento denove aperis la nigraj nuboj de la nuklea kaj neŭtrona minaco. Denove sentiĝas la alblovo de „la malvarma milito“ Kaj prave la monda progresema scienca medio denove estas en maltrankviliĝo pro tiaj faktoj, kiel la deklaro de la prezidanto de Usono Reagan kaj de la ministro de la defendo Weinberger, de la generaloj de NATO, la intenco de Usono instali neŭtronajn armilojn en Okcidenta Eŭropo.

Apartan indignon provokas la asertoj de la propagandantoj de la neŭtrona bombo, ke ĝi havas iujn avantaĝojn kaj estas pli humana rimedo, ĉar ĝi mortigas nur la homojn kaj ĉiujn vivajn estaĵojn. Mortigas la homon, la plej superan kreaĵon de la naturo, pri kiu estas kreita la tuta intelekta kaj materiala kulturo, por kies rajtoj en Usono oni verŝas krokodilajn larmojn. . . Kaj tion oni pritaksas plej granda akiraĵo de la usona milita tekniko.

Al la neŭtrona armilo, al la intencoj pri produktado kaj instalado en Okcidenta Eŭropo la monda progsa scienco kategorie diras — NE.

Hodiaŭ en la mondo 40 elcentoj de la financaj rimedoj, destinitaj por scienco estas elspezataj por militceloj. Ĉirkaŭ 25 elcentoj de la monda scienca potencialo, ĉirkaŭ miliono da sciencistoj, estas utiligataj en la milita produktado.

Lastatempe la agresemaj kaj reakciaj fortoj, kiuj ĉiam estis kaj estas kontraŭ malpliigo de la streĉo kaj sereniĝo en la internaciaj rilatoj, aktiviĝis. Kontraŭ tiuj fortoj per sciencaj argumentoj ribelas la Monda Federacio de la Sciencistoj, aŭ kiel iuj jam nomas ĝin „Internacio de la Scienco“. Ĝi hodiaŭ unuigas pli ol 450 000 sciencistojn el 57 landoj. Unu el ĝiaj fundamentaj taskoj estas batali, ke la scienco, tiu potenca forto, kiu movas

la vivon antaŭen, estu utiligata nur por la bono de la homoj, por la progreso kaj ne por la celoj de la milito.

De post 1948, kiam estis metita la fundamento de la Monda Federacio de la Sciencaj Laboristoj—farĉe tiaj eminentuloj kaj progresemaj sciencistoj kiel prof. E. J. Curie, prof. J. Bernal, prof. C. Power, prof. L. Burhop, akad. J. Oparin k. a. ĝis hodiaŭ la „Internacio de la Scienco“ kuraĝe kaj senhezite batalas por utiligo de sciencaj atingiĝoj nur por pacaj celoj, por antaŭgardo de la homaro de nova mondmilito.

Hodiaŭ la Monda Federacio de la Sciencaj Laboristoj estas en plena mobiliziĝo. Dum majo pasintjare en sia asembleo en Berlino ĝi akceptis alvokon al la sciencistoj kaj popoloj de la tuta mondo, en kiu estas dirite: „Ni, la sciencistoj, kiuj laŭ la aŭtoritato de la ricevitaj konoj kaj specife de la laboro plej bone imagas la postsekvojn de uzo de armiloj por amasa neniigo, volas averti: ĉiu nuklea milito signifas katastrofon por nia planedo. Jen kial hodiaŭ nia plej necesa tasko estas konservado kaj plifortigo de la internacia sekureco“.

Plue per la alvoko oni insistas estigi pacan kreaĵon atmosferon, favoran klimaton por scienca prilaboro de tutecaj sciencaj problemoj, kiuj hodiaŭ staras antaŭ la homaro. Kaj tiaj problemoj estas: la energia, la produktada kaj ekologia problemoj por konservado de la ĉirkaŭa medio, la demografia demando pri reguligo de la kresko de la loĝantaro, la esploro de la Kosmo kaj ankoraŭ vico da aliaj, ligitaj kun la estonta evoluo de la vivo. Sed por ilia solvado estas necesa trankvila atmosfero, estas necesa interkompreniĝo kaj kunlaboro inter la popoloj, fido inter la homoj. La ĝeneralaj problemoj estus solvitaj tre rapide, se la centoj da miliardoj, hodiaŭ por armado, estus utiligataj nome por sciencaj esploroj.

Sian proteston kontraŭ nuklea kaj neŭtrona armiloj la Monda Federacio de la Sciencaj Laboristoj manifestis en organizita dum oktobro pasintjare internacia simpozio „Malarmado kaj evoluo.“ Tiu grava forumo okazis en Internacia domo de la sciencistoj „Jolio Kjuri“ apud Varna en Bulgario. Ĝin partoprenis elstaraj sciencistoj el multaj landoj. En la unuanime akceptita deklaro estas dirite: „La partoprenantoj en la simpozio „Malarmado kaj evoluo“ aprobas la alvokon de la reprezentantoj de 134 landoj en la Monda Popolpaca Parlamento de la Popoloj kaj entute aliĝas al la batalo en Eŭropo, Usono kaj ĉiuloke kontraŭ la instalado de rakedoj kun mezdistanca flugo en Okcidenta Eŭropo kaj al la protestoj kontraŭ la neŭtrona bombo.

Per sia tuta agado la Monda Federacio de la ►

internacia instituto pri pacproblemoj

L. Voronkov, S. Prozorovskij

En antaŭaj numeroj de nia revuo ni publikigis materialojn pri la agado de iuj internaciaj esploraj institutoj, kiuj okupiĝas pri esplorado de vojoj al paco kaj malarmado (Vidu la materialojn pri la Internacia Instituto pri Esploro de Pacproblemoj en Stokholmo — SIPRI en n-ro 3, 1979, kaj pri la Internacia Instituto pri Paco en Vieno en n-ro 1, 1980). Ĉar la agado de tiaj institutoj akiras ĉiam pli grandan aktualecon, en tiu ĉi numero ni aperigas artikolon pri alia sampeca instituto — la Internacia Instituto pri Esploro de Pacproblemoj en Oslo (PRIO), unu el la plej grandaj kaj aŭtoritataj centroj, funkciantaj en tiu ĉi kampo.

PRIO aperis kiel memstara organizo en 1966 surbaze de sektoro de la Instituto pri Sociaj Esploroj en Oslo (Norvegio), ekzistanta depost 1959. Iniclatinto de ĝia kreo estis la fama sciencisto Ju. Galtung. La celo de la instituto estas stimuli, organizi kaj efektiviĝi sciencajn esplorojn en la kampo de pacaj rilatoj inter la nacioj — kaj aliaj grupoj, okazigi konferencojn kaj seminariojn kaj disvastigi sciencajn informojn pri la pacproblemoj. La gvidadon de la agado de la instituto efektivas ĝia estraro.

La problemaro de la sciencaj esploroj de l'instituto ampleksas vastan spektron de aktualaĵoj, inter ili la problemoj de veterarmado, de nedisvastigo de nukleaj armiloj, de malarmado, de ekstera politiko de Norvegio. Dum la lastaj jaroj efektiviĝis la prilaboro de teoriaj problemoj de la internaciaj rilatoj, de apartaj aspektoj de la monda krudaĵa kaj nutraĵa problemoj, de ekonomio kaj politiko de la evoluantaj landoj, de internacia kontrolo super la aktivado de multinaciaj korporacioj.

Apartan lokon en la programo de PRIO okupas la problemoj pri homrajtoj. Estas science analizataj tiaj temoj kiel internacia juro kaj nenigo de fremda ŝtato, suvereneco, la memdetermino kaj homrajtoj, la rilato de hegemonio kaj subigo surbaze de ekzemplo de la rilatoj de la evoluantaj landoj kun la transkontinentaj kompanioj

Sciencaj Laboristoj aktive partoprenas en la batalo por malarmado, sereniĝo kaj savo de nia planedo de la flamoj de nova nuklea milito.

Tradukis: Minko Conkovski

kaj la evoluantaj kapitalismaj landoj, internacia reguligo de la aktivado de transkontinentaj korporacioj.

La laboro de PRIO determiniĝas de la strebo helpi ĉiumaniere la disvastigon de ideoj pri senperforta solvo de la problemoj de la nuntempa socio tiel sur nacia kiel sur internacia niveloj.

Ekde 1964 la instituto aperigas sian revuon „Journal of Peace Research“ (Revuo de Pacesplorado). Membroj de ĝia redakta komitato estas sciencistoj el Norvegio, FRG, Grandbritio, Usono, Finnlando kaj Svedio. Sur la paĝoj de la revuo esploroj el Sovetunio kaj aliaj socialismaj landoj multfoje aperigas artikolojn.

Krome, PRIO kune kun aliaj esplorcentroj en la Okcidento, eldonas trimonatan bultenon „Bulletin of Peace Proposals“ (Bulteno de Pacaj Propozoj), en kiu estas publikitaj eltiraĵoj el la pacaj proponoj, faritaj de la registaroj de diversaj landoj, de ŝtataj kaj politikaj agantoj, de internaciaj organizoj, de apartaj sciencistoj.

La instituto eldonas ankaŭ popularajn informbroŝurojn pri demandoj de la internaciaj rilatoj, preparas instruprogramojn por studado de problemoj de paco por diversaj kategorioj de studentoj. La sciencistoj de PRIO okupiĝas pri aktiva prelega agado kiel en Norvegio, samtiel en aliaj landoj. Multfoje reprezentantoj de la instituto gvidis instruprogramojn en la Internacia Interuniversitata centro en Dubrovnik (Jugoslavio) pri diversaj problemoj de la internaciaj rilatoj.

En 1977 kunlaborantoj de PRIO partoprenis la preparon de enciklopedio pri internaciaj demandoj, publikita de la norvega eldonejo „Paix“ (Paco).

La instituto subtenas vastajn kontaktojn kun sciencaj centroj kaj sciencistoj de Okcidenta Eŭropo, Nordameriko, Japanio, evoluantaj landoj, kun internaciaj organizoj kaj institutoj kiel UNESKO, UNKTAD, UNITAR, Internacia Asocio pri Esploro de Pacproblemoj (IPRA), kun Pugwash'a movado. Ĝi kontaktas ankaŭ sciencistojn de la socialismaj landoj.

Kunlaborantoj de la instituto partoprenas plurajn internaciajn konferencojn, seminariojn, simpoziojn kaj kongresojn — la internaciajn somerajn lernejojn de IPRA, Pugwash-seminariojn, Internaciajn somerajn lernejojn ĉe la Universitato de Oslo k. a. Reprezentantoj de PRIO plur-

(Daŭriĝo sur p. 5)



USSR

Esperanto-societo „Amikeco“ en urbo Ternopol (Ukraina Soveta Socialisma Respubliko) organizis 8—10 de majo 1981 ekskurson en montaron Karpatoj, okaze de la 36-a venko-tago super faŝisma Germano. Partoprenis ankaŭ aliregionaj esperantistoj. La 9-an de majo, la grupo supreniris la plej altan pinton de Karpatoj-Hoverla (2058 m), kie estis fiksita Esperanto-standardo.

La 7-an de majo, dum interkona vespero, kaj la 9-an de majo, dum mitingo organizita en la montaro, la parolantoj substrekis la signifon de la batalado por paco, kaj la rolon de Esperanto en tiu batalado.

Leon Zimels

Bulgario

Je la 29-a de junio en Sofio okazis tutlanda esperantista konferenco. Unu el la punktoj rilatis la batalon por paco, pri kio raportis la honora prezidanto de MEM Nikola Aleksiev. Priskribante la maltrankvilan bildon de la mondo nun, kiam la agresemaj rondoj en okcidento minacas la popolojn per terurega nuklea armilo, li evidentigis la neceson kaj la devon de ĉiu esperantisto partopreni la batalon por paco, kontraŭ la minacanta imperiismo, por malarmado kaj neniigo de la nuklearmilaro.

V. O.

En la apudmara urbo Varna en la fino de junio okazis la tradicia Mara Amika Renkontiĝo Esperantista. Partoprenis samideanoj el multaj distriktoj de la lando kaj el eksterlando. La konferencon salutis Violin Oljanov, membro de la Centra Estraro de BEA kaj ĉefredaktoro de revuo „Paco“. Li evidentigis la bonan efikon de tiaj renkontiĝoj por amikiĝo kaj kreo de internaciisma etoso kaj por kontribuo al la batalo por paco.

La kunveno akceptis leteron al la Internacia Komitato de MEM. En ĝi interalie ni legas:

„Ni, la partoprenantoj en MARE-81, estas ege maltrankviligitaj pro la malbonaŭguraj maĥinacioj de la imperiistoj celantaj bruligon de nova nuklea milito. Ni protestas kontraŭ tiuj kanibalaj planoj kaj esprimas nian apogon al via batalo por konservo de la paco. Ni forigu la minacon al la tuta mondo! Vivu kaj floru la paca kunvivado de la popoloj!

Saŝa Nedeva

DEKLARO DE ASEMBLEO DE BULGARA SCIENCAKADEMIO

La asembleo de Bulgara Akademio de l'Sciencoj akceptis jenan deklaron al la ĝenerala sekretario de UN Kurt Waldheim kaj al la sciencakademioj en ĉiuj landoj de Eŭropo:

En XXVI-a kongreso de Komunista Partio de Sovetunio Leonid Breĵnev faris proponon, ke oni fondu aŭtoritatan internacian komitaton el plej elstaraj sciencistoj de ĉiuj landoj, kiu montru kiel vivnecese estas malebligi nuklean katastrofon.

Bulgara Akademio de l'Sciencoj plene subtenas tiun ĉi proponon. Kreo de tia internacia komitato donos eblecon al la popoloj pli klare konscii la fatalajn por la homaro postsekvojn de nuklearmilito. Tio estas vivgrava precipe nun, kiam oni serioze minacas la pacon. La registaroj de iuj grandaj ŝtatoj rilatas malestime al la sorto de la homaro. La militaj buĝetoj en tiuj landoj rapidege kreskas kaj en la vetarmado oni senĉese faras paŝojn al nuklea katastrofo.

Por ke estu konservita la paco en la nuntempa situacio de la mondo, estas necese aktiva, konsekvenca, totala batalo por paco. Kreo de internacia komitato de sciencistoj, kiel proponas L. Breĵnev, povus subteni konsiderinde tiun batalon. Ĝi kontraŭstarigos la aŭtoritaton de la scienco, la sciencajn konkludojn kontraŭ la antaŭjuĝo, la trompo, la timokaj la malamo, por mobilizi la mondan socian opinion. Tiamaniere la popoloj povus pli bone kompreni, ke la nuklea milito minacas

— ne apartajn geografiajn regionojn, sed la planedon,

— ne apartajn popolojn, sed la homaron,

— ne apartajn kulturajn valoraĵojn, sed la homan civilizon.

Necese estas informi la homojn pri la danĝeraj agoj de la militaristoj, pri la superarmado, pri la ruiniga forto de l'amasigitaj nuklearmilitoj, kiuj estas direktataj kontraŭ vivaj homestajoj. Necese estas senmaskigi la malutilajn sugestojn, ke eblas „lokalizita“ nuklea milito, kiu ne minacus la tutan homaron. Oni devas aŭtoritate klarigi al la popoloj, ke ĉe nuntempa dislokigo de la fortoj en la mondo ne eblas „lokalizita“ nuklea milito. Ĉiu nuklea eksplodo ĉe eventala milito kaŭzos antaŭ ĉio neniiĝon de Eŭropo desur la vizaĝo de la tero, ĝi signifus milojn da Hiroŝimojn en la loko de la prosperantaj urboj sur nia kontinento.

Pro ĉio ĉi al tiuj fortoj, kiuj intense strebas al nuklea milito, devas kontraŭstari la aŭtoritato kaj la forto de la scienco, la konkludoj de la progresema scienca socio en la tuta mondo. Oni ne devas lasi triumfon de la danĝera doktrino, ke la paco povas sin apogi nur sur armilaro. La sciencistoj estas respondecaj antaŭ sia konscio, antaŭ la popoloj kaj antaŭ la historio por konservo de la mondopaco. Ĝuste ili plej bone scias, ĉar ili okupiĝas per scienco, kiom da malfeliĉoj alportus al la homaro nuklearmilito. Pro tio ili devas batali kontraŭ la strebojn de la militaristoj, ke la grandaj sciencaj inventoj akiritaj dum nia jacento rezulte de scienteĥnika progreso uziĝu por pereigaj celoj. La scienco devas esti utiligata por bontarto de la homaro, por ekfloro de la civilizo.

La asembleo de la Bulgara Sciencakademio sin turnas al UNO kaj al ĉiuj sciencakademioj en Eŭropo kun alvoko krei internacian komitaton el aŭtoritataj sciencistoj, kiu laboru por defendo de l'homaro kontraŭ la minaco de nuklea katastrofo.

(Sekvas subskriboj de akademianoj)

Tradukis: Saŝa Nedeva

ekumena voĉo de paco

Usono. Okaze de la 1-a datreveno de murdo de la sansalvadora ĉefepiskopo O. A. Romero okazis en marto 1981 diversaj aranĝoj:

La katolika, eĉ la protestanta eklezioj honorigis lian memoron per Diservoj, eĉ protestaj kunvenoj. Episkopoj de ambaŭ eklezioj alvokis la registron de Reagan, ke ĝi tuj ĉesigu ĉiun armean, eĉ ekonomian helpon al la salvadora hunto, ĉar ĝi kaŭzis la morton de la ĉefepiskopo kaj la nunan teroron en la lando.

Prezidanto de la episkopa konferenco en Usono, John Roach, ĉefepiskopo de Saint-Paul-Minneapolis, kondamnis en televida intervjuo la usonan helpon al la salvadora reĝimo, kritikante samtempe limigon de la sociala zorgo en Usono, trafanta la plej bezonantajn homojn kaj helporganizaĵojn en Usono.

Germana D. R. En la tagoj de 20—21. 3. 1981 kunvenis en Berlino la internacia komitato de la Berlina konferenco de europaj katolikoj (BK), kiun ĉeestis pastroj, eĉ laikoj el 20 eŭropaj landoj. La ĉeftemoj estis:

Raportoj pri la ĵus okazinta ekkontakto de la internacia delegacio de BK kun la registraj reprezentantoj en la Madrida kunveno, cele influi iliajn konkludojn favore al malarmado kaj pri la agado rilate la nunan — de UN proklamitan — „Jaron de invalidoj“. En la diskuto estis akcentite, ke ni ne devas allasi novan militon, precipe ankaŭ pro tio, ke ĝi tutmonde kaŭzus multoblighon de invalidvicoj.

(Daurigo de p. 3)

foje partoprenis la simpoziojn de la Internacia Instituto de Paco en Vieno, kiu organizas renkontiĝojn de sciencistoj de Oriento kaj Okcidento por pridiskuto de plej aktualaj problemoj de la nuntempaj internaciaj rilatoj.

Tamen ne kun ĉiuj konkludoj kaj tezoj de sciencistoj de PRIO oni povas konsenti. Ekzemple ne estas akceptebla la strebo de la esploristoj de PRIO apliki la skemon de disvolviĝo de la interŝtataj rilatoj al la rilatoj interne de la socio. Sed tiu ĉi aliro de PRIO al la problemoj de la disvolviĝo de la socio ne gravas, kiam temas pri esplorado de la vojoj al stabiligo de paco kaj al reguligo de konfliktoj sur la internacia areno, pri kio atestas la fruktodonaj diskutoj de la sciencistoj el la landoj de Oriento kaj Okcidento.

Tradukis: D. Haĝiev
(el revuo „Vek XX I mir“ — Moskva)

Plue oni pritraktis agadplanon por la jaro 1981, kies ĉefa aranĝo — renkontiĝo kun reprezentantoj de amasinformiloj — okazos septembre 1981 en Berlino je temo: „Komunikiĝo kaj agado de katolikoj en porpaca servo“.

Pri la nuna danĝera mondsituacio estis eldonita jena proklamo (esenco): „Pliigado de la rebra mondarmado ege maltrankviligas nin. En intereso de konservo de nia Dia kreitaro ni apelacias ĉiujn registarojn en Eŭropo, plue de Usono kaj Kanado, ke ili zorgeme esploru ĉiujn ekzistantajn pacproponojn kaj senprokraste komencu traktaĵojn pri ili. La tempo ne atendas!“

Al tiu ĉi alvoko instigis nin precipe la urĝa admono de papo Johano Paulo la 2-a, farita la 25. 2. 1981 en Hiroŝima, postulanta, ke ni ĉiuj laboru por malarmado kaj malpermeso de nukleaj armiloj. Lia „PREGO DE HIROŜIMA“ fariĝu spirita radiumo, trapenetrona ĉiujn homojn per petencaj inspiroj kaj kuraĝaj instigoj, realigontaj tuthomaran harmonion kaj tumondan pacon“.

Nederlando. Ekumena Kongreso de la Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI) kaj de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) okazos de la 23-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 1981 en moderna konferencejo „De Bron“ en la nederlanda urbo Dalfsen.

Germana D. R. En la tagoj de 22.3. —23. 3. 1981 okazis en Berlino la VI-a konsultiĝo inter reprezentantoj de la Kristana Packonferenco (KP) kaj de la Berlina konferenco de eŭropaj katolikoj. (BK). Gvidantoj de ambaŭ delegacioj raportis pri la lastatempa agado kaj kunlaborado de KP kun BK por internacia malstreĉiĝo kaj malarmado.

Estis interŝanĝitaj informoj pri porpaca agado de eklezioj, precipe pri la porpaca strebado de papo Johano Paulo la 2-a pacmesaĝoj de la patriarko de la rusa ortodoksa eklezio Pimen, paca laboro de eŭropaj protestantaj eklezioj kaj batalo de kristanoj en Latina Ameriko por la sociala justeco kaj liberigo.

Estis rememorigita la martira morto de la sansalvadora ĉefepiskopo O. A. Romero, kiu fariĝis ĵus 1 jaro viktimo de atenco dum celebrado de Diservo. La heroa episkopo oferis sian vivon pro sia kuraĝa batalo por rajtoj de la suferanta salvadora popolo. Lia morto devoligas nin al intensigo de nia laboro por justeco kaj paco.

La pasintjaran *porpacan Mondparlamenton de la Popoloj en Sofio* partoprenis ankŭ— reprezentantoj de KP kaj BK, kiuj tie fariĝis kunfondintoj de la internacia komisiono de religiaj porpacaj laborantoj, preparanta nuntempe porpace gravan projekton de *Mondkongreso de Eklezioj kaj Religiaj Pacorganizaĵoj por Generala Malarmado kaj Mondpaco*.



ni fariĝu virtulozoj

La vivo estas la plej mirinda valorajo en la Universo. Triste estas, kiam homo perdas vivon naturmaniere, tragike, se lia vivo estas forprenata perforte kaj ŝoko ekestas, se ĝi estas forrabata de batalanto por virtulozeco de la tuthomara vivo. Tia tutmonda ŝoko okazis la 13an de majo 1981 per la atenco kontraŭ papo Johano Paŭlo la 2-a per kiu li estis grave vundita, sed — kvazaŭ mirakle — transvivis ĝin.

La ĉeno de internaciaj terorismaj agoj, ekkateniganta la homaron kaj fariĝanta jam kvazaŭ ĉiutaga memkompreneblaĵo, estas degenera signo de la homa socio, malfermanta abismon sub ĝi. Tiu ĉi evoluo vekas ĝeneralan timon, sed bedaŭrinde — pro laŭŝajna senpoveco kontraŭ ĝi — ankaŭ flegmecon. Timo kaj apatio silentigas homojn, kio ebligas pluparoli al armiloj. . . Krome, se la perfortaĵoj ne tuŝas rekte nin, ni emas rigardi ilin kiel nurajn — pli aŭ malpli agrablajn — sensaciojn. . .

Sed la atenco kontraŭ papo ne devus resti nura sensacio, ordinara ĉenero en la internacia ĉeno de terorismo, ĉar fakte temas pri atenco kontraŭ justeco kaj paco, do kontraŭ elementa intereso de ĉiuj homoj. Tial ĝi devus mobilizi nin ĉiujn forigi timon eĉ indiferenton kaj instigi nin energie ekparoli por fine silentigi jam ĉiujn armilojn. Sed kiamaniere praktike estri tiun ĉi enorman taskon?

Nia modelo fariĝu la medicino. La homa korpo konsistas el multaj organoj kaj miliardoj da ĉeloj, kiuj — se ne estas influataj per negativaj fenomenoj — kreas mirindan, harmoniplenan funkciadon de la tuta korpo. La difektitan harmonion la medicino klopodas restarigi laŭ unuecaj maksimumoj, per uzado de universale aplikeblaj medikamentoj.

Analoge la homaro — konsistanta el miliardoj da homoj — estus sana, se ĉiuj homoj vivus laŭ leĝoj de la Universala Harmonio. Bedaŭrinde ili estas ege influataj per plej diversaj negativaj fenomenoj — grandparte devenantaj el preferado de egoisma, anstataŭ komuna prospero — tial ili ne plenumas sian laŭnaturan, sanan mision kaj la tuta homaro malsanas. La nuna science-teknika progreso evoluigis ja eĉ situacion, en kiu eĉ nur unu homo, preferanta tian propran abundigadon — simile al kanceriĝinta ĉelo en la homa korpo — povus kaŭzi pereigon de la tuta homaro. . .

Nek medikamentoj en la medicina afero, nek rimedoj por la tuthomara harmonio povas esti inventataj per nuraj paroladoj en la konferencoj; tiacele necesas precipe pena eksperimentado

en la laboratorioj. Laŭ tiuj ĉi spertoj ni ĉiuj fariĝu kuracistoj de la homaro: en niaj vivmedioj — kvazaŭ en laboratorioj — ni celkonscie malkovradu verajn kaŭzojn de la negativaj fenomenoj, fuŝantaj vivon de unuopaj anoj de la homaro, inventadu kaj aplikadu medikamentojn, kapablajn resanigi la homaron kaj krei kondiĉojn, en kiuj ĉiuj homoj povus fariĝi virtulozoj de vivo.

Fortigilo en tiu ĉi nia strebado fariĝu la universale komprenebla kaj akceptebla interpreto de la „Preĝo de Hiroŝima“, kiun papo Johano Paŭlo la 2-a preĝis la 25. 2. 1981 ĉe la monumento de 97 miloj da senkulpaj viktimoj de la unua atombombo, ĵetita en la unua aŭgusta semajno de la jaro 1945 — sur la japanan urbon Hiroŝima:

„Nia komuna Fonto de Vivo — Dio, evoluigu en ni, ĉiuj homoj de la planedo Tero:

- senton de respondeco pri vivo sur Tero,
- harmonion inter niaj agoj kaj Konscienco,
- prudenton anstataŭigi antaŭjuĝojn per interkompreniĝo,
- forton venki malamon per amo,
- inspirojn transformontajn maljustecon en justecon,
- kuraĝon por ŝanĝi vojn de milito en vojon de paco,
- entuziasmon ĉie konstante pluflorigadi vian donacon — vivon.

Ĝi koncentrigu niajn pensojn por trovi novajn efikajn vojojn al justeco kaj paco. Ni instigu ĝian komunan preĝadon — rememore kaj averte je la tragedio de Hiroŝima — ĉiun unuan dimanĉon en la monato. Se ĉiuj homoj de la mondo partoprenus komence almenaŭ tiun ĉi simplan spiritan aktivadon, povus fariĝi psikologia miraklo: mobilizo kaj koncentriĝo de pozitivaj fortoj en ĉiuj homoj por sistema, pacmaniera forigado de ĉiuj negativaj fenomenoj en la tuthomara socio, por plena resanigo de ĉiuj ĝiaj anoj. La plej malfacila ĉiam estas la komenco: indiferentecon venki per entuziasmo. Sed la nobla celo meritas nian penon.

Ni unuece streĉu niajn fortojn por atingi la komunan celon, en kiu ĉiuj homoj fariĝos virtulozoj de vivo kaj la tuta homaro transformiĝos en orkestron kun unu dirigento — la Konscienco — peranto de la Harmonio de Universo. Tiam la plej mirinda afero en Universo — la vivo — sane pulsos en la tuta homaro, kreiĝos arda internacia fido, en kiu ĉiuj detruiloj transfandiĝos en konstruilojn, malsato, kaoso kaj militoj definitive cedos lokon al la tuthomara bonfarto, harmonio kaj tutmonda paco.

J. K.

LA NEDERLANDA POPOLO BATALAS

La rezisto kontraŭ la usona harstariga krimularo en okc. Eŭropo rapide kreskas. Oni preferas daŭrigi la vivon ol pereaĉi en nuklea infero. La situacio tamen estas danĝerega. En majo okazos en nia lando balotoj. La opiniondoj ĉiam indikas, ke la maldekstraj fortoj tre kreskas kaj verŝajne ricevos grandan plimulton. La socialista gvidantaro estas tre kontraŭsoveta, sed la membroj (kiel antaŭ nelonge montris la kongreso de la socialista partio) postulegas forigi ĉiujn atomarmilojn el nia lando (jam 200 el ili troviĝas sur nia teritorio). Ankaŭ en Anglio la maldekstraj fortoj tre kreskas kaj certe „the iron Lady“ (la fera damo) kiel oni nomas Thatcher perdos la venontajn balotojn. Tuta okc. Eŭropo troviĝas en profunda ekonomia krizo. En Anglio jam pli ol 2 milionoj da senlaboruloj, ĉe ni 350.000 kaj 700.000 antaŭtempe devis ĉesigi sian laboron pro aliaj kaŭzoj (ĉu malsaneco, ĉu ili estis eligitaj el la fabrikoj pro tio ke oni ne plu bezonis ilin. Ili antaŭtempe estis „pensiitaj“, sed oficiale ne apar-nas al la senlaborularo). En Belgio 450.000 senlaboruloj, kaj laŭ la sindikatoj eĉ 700.000. En okc. Germanio 1,5 milionoj da senlaboruloj. En nia lando la ekstreme dekstra registaro febre laboras por malkonstrui la sistemon de socia prizorgado, kiun en nia lando estas konstruita de post la milito. Kaj ja sindikatoj silentadas aŭ nur parole protestetas, ĉar ne volas striki. Kaj se okazas strikoj la juĝistoj malpermesas tion aŭ oni dis-batas la strikantojn per peze armitaj policistoj kaj eĉ enkarcerigas la gvidantojn de la strikantoj.

Antaŭ nelonge pola delegacio venis en Rotterdam. Estas delegacio de la „libera“ sindikakato nomita „Solidareco“. Ili evidente ne sciante (ĉu) kio okazas en ĉi tiu lando, estis akceptitaj de André van der Louw, la urbestro de Rotterdam (socialisto). La delegacio de „Solidareco“ honorigis tiun urbestron per honora membreco en ilia sindikato. Tiu sama van der Louw sendis peze armi-

tan policistaron kontraŭ la strikantajn dokistojn, disbatis ilian kunvenon kaj enkacerigis la gvidantojn. Cetere ofte en niaj urboj okazas grandaj bataloj kontraŭ la polico (eĉ per tankoj armita, kiuj ŝprucigas „nur“ akvon miksitajn kun larmiga kaj vomiga gaso).


En nia lando oficiale 90.000 domoj staras malplenaj, nelogataj, ĉar ili troviĝas en la manoj de spekulistoj. Aliflanke dekmiloj da homoj, precipe junaj, ne havas domojn, ĉar ili estas



tre multekostaj. La sekvo estas, ke la junularo neleĝe ekloĝas en la domoj malplenaj. En Amsterdam, sed ankaŭ en aliaj urboj, ekz. en Nijmegen, kelkaj malplenaj loĝblokoj estas loĝataj jam dum kelkaj jaroj de tiuj homoj. Nun oni akceptis novan leĝon en la parlamento, en kiu havas la plenan potencon la ultraj dekstruloj. Tiu leĝo ebligas, ke la aŭtoritatoj povas perforte forigi la loĝantojn de tiuj domoj, kiuj troviĝas en la manoj de la spekulistoj kaj kiuj leĝe ne estas enloĝataj. Antaŭ du semajnoj denove okazis grandaj bataloj en urbo Nijmegen. Tie centoj da junaj virinoj ekkonis sur la strato por reteni la tankojn. Militpolico venis, disbategis la pacamajn virinojn. Estis tiel terure, ke multaj el ili vundiĝis. Postsekvis gradaj demonstracioj de 20.000 homoj en la urbo por protesti kontraŭ la kruela perforto de la polico. Per tankoj oni tute detruis la domojn. Estis senprecedencaj protestdemonstracioj en tiu sufiĉe dekstrula urbo, kie la maldekstraj partioj estas senpovaj.

Aprilo 1981

Ru Bossong



Sirmante sin per la mito pri „soveta danĝero“ Britujo elspezas 11 miliardojn da dolaroj por militaj celoj dum la financa jaro 1980—1981.

Nina Matjaŝ

LULKANTO AL LA PATRINO

Nur rare esti kune ni profitas,
Forgesu pri ĉiama maltrankvil',
kuŝu, mia panjo lacigita,
al vi mi kantos, kvazaŭ ĉe lulil'.
Dormetos ŝtormoj en okuloj brunaj —
ne lasos ĉi mi eĉ al polver'.
En song' vi renkontiĝu kun vi juna,
kun via, kara panjo, primaver'.

De la destino la promes' serena
iome realiĝos dum la viv'.
Ekkuŝu, mia panjo fidoplena,
mi kantos kvazaŭ ĉe lulil' al vi.
Dormetos ŝtormoj en okuloj brunaj —
ne lasos fali mi eĉ al polver'.
En song' vi renkontiĝu kun vi juna,
kun via, kara panjo, primaver'.

Ĉielon super vi la amo tenas,
per am' radias hejma harmoni'.
Ekkuŝu, mia panjo ridetema,
kiel antaŭe vi, nun kantos mi.
Dormetos ŝtormoj en okuloj brunaj,
ne lasos fali mi eĉ al polver'.
En song' vi renkontiĝu kun vi juna,
kun via, kara panjo, primaver'.



Mi pensis, ke mi printempon amas nur:
printempe mi eraras, kie estas:
printempe en anim' espero nestas, —
mi pensis, ke mi printempon amas nur.

Ni pensis, ke mi ne ĝojas pri l'aŭtun':
aŭtune mi malgajas kaj sopiras,
enuas senti—kion mi deziras, —
mi pensis, ke mi ne ĝojas pri aŭtun'.

Sed falis jen sur relon la disiĝ',
kaj kiom longe sole per imago
min gvidas al patrujo sava vago, —
ekfalas jen sur relon la disiĝ'.

Kaj ĉio logas, vintro kaj somer',
folifalado kaj degel' rapida.
Se l'tero pri la varmo ne avidas, —
dio mia ben' al vintro kaj somer'.

FONTO

Per hel' betula falis la Plenluno
en arbustaron, kie bruas vent'.
Ekmemorigos nepre dum cerbumo
al vi ja via ĝojsopira sent'
pri tio arbustaro kaj pri l' Luno.

Nina Matjaŝ estas juna belorusa poetino. Si naskiĝis en vilaĝo apud negranda urbeto Beloozjorsk en Bresta regiono de Belorusio. Post fino de mezlernejo ŝi studis dum kvin jaroj francan kaj germanan lingvojn kaj nun laboras kiel instruistino en teknika lernejo en Beloozjorsk. La poetino jam eldonis tri versaĵlibrojn en belorusa lingvo. Si vaste okupiĝas pri tradukado de prozo kaj poezio el la lingvoj franca, germana kaj pola.

Pri Esperanto ŝi diras: „Laŭ mia opinio, Esperanto iele similas al la arto. Ĉiu speco de la arto estas artefarita en sia fundamento. Ankaŭ Esperanto estas lingvo artefarita, kaj la rolo, kiun ĝi surmetis al si — interamkigi la homojn el diversaj nacioj, — ĉu ĝi ne estas adekvata al la rolo de la arto? . . .“

Liberiĝinte de aliaj ĉenoj
por nepre kaj deviga re-alven',
animo via, kiel iam, venos
al font' saniga kiel al eben',
liberiĝinte de aliaj ĉenoj.

Ĉi estas sola tie, pura fonto.
Vi nun ne pensas eble, pro horŝpar',
ke respegulas ĝi la tutan mondon,
ci-kiun paroligas arbustar'.
La amo. Ĝi similas al ĉi fonto.

Per hel' bastula falis la Plenluno. . .

En songoj miaj nun forestu vi,
car ĉio inter ni jam estas decidita,
kaj pri l'interkonsent' memoras mi.
En song' forestu vi.

Renkontojn nur eviti vanas pen'.
Mi ne ofendos vin per mia sentesprimo.
Mi vin ne vidos foje en ĉagren'.
Eviti vanas pen'.

Eksidu ni. Al mi ridetu vi.
Kaj ankaŭ mi — trankvile kaj senĝene.
Sed pri la interkonsent' memoras mi.
En song' forestu vi.

SENDEPENDECO

Vi pensas, sendependas vi en ver'.
se vi sen mi — neatingebla fidas.
Sed venas mi al akvo de l'river',
kaj mi en ĝi vizaĝon vian vidas.

Vi pensas, estas vi libera vir',
se vi en sentoj gardas vin sufiĉe.
Sed nur aŭdiĝu eta mia dir' —
kaj vi ekstremos ĝoje kaj felice.

Pardonu pro plej . . . etoe . . . da tortur'.
Malliberigi vin mi n inklinas.
Por mi sufiĉas se la am' dominas,
la sama restu vi. Vi restu nur!



*Se dum la vintro mankas floro,
Do ni pri ĝi ne plu sopiru.*

Sergej Jesenin

Kaj mi dumnokte revas pri la sun',
dum tag' — pri stel',
dum neĝventeg' — pri floro.
Amaras la juni-mantena lum',
la vojo serpentumas en la foron.

Por ĝi do kie,
kia estas fin' ?
Denove nuboj kovras la ĉielon.
Kaj mi ne diros, ĉu atingos ĝin
videblan, senbridan revon belan.

En koro tamen nestas krio, zum',
Ia koro kredas: ĉio fordoloros. . .
Sopir' obsedas nokte — pri la sun',
dum tag' — pri stel',
dum neĝventeg' — pri floro.

El belorusa: Adam Pavlukovec

unua oficvojaĝo

Vladimiro Pac jurko

— Ĉu vi vokis min, Ivan Dimitroviĉ? — demandis Olga, enirinte la kabineton de ĉefredaktoro.

— Jes, Olga. Mi petas vin sidiĝi — la redaktoro montris sur la seĝon ĉe la tablo. Poste li demetis la okulvitrojn kaj atente rigardis la junulinon.

— Mi esperas, Olga Miĥajlovna, — lia voĉo sonis oficiale kaj samtempe milde, — ke vi jam konatiĝis kun la redakciaj aferoj? Kaj, verŝajne, jam rememoros min per malbona vorto, ke mi nenien vin sendas? — ruze duonfermite la okulojn, demandis la redaktoro.

Olga ruĝiĝis. „Kiel li tralegis miajn pensojn?“ — miregis ŝi kaj volis ion nei, sed nur klinis la kapon. Ivan Dimitroviĉ ekridis:

— Do, mi divenis. Kaj jen al vi la unua komisiono de la redakcio. Veturu al Vinnica regiono, en... — la redaktoro rigardis iun paperon kaj diris la urbonomon. — Tie loĝas Tatjana Vdovina. Pentristino. Vi konatiĝos kun ŝi kaj poste skribos skizon. Veturu morgaŭ. Sed antaŭe rigardu en la bildgalerio la ekspozicion de pentristoj-amatoroj. Tie estas eksponita ŝia pentraĵo. Ĝi nomiĝas „Flegistino“. Al Tatjana Vdovina la ĵurio aljuĝis la unuan premion. Se oni juĝus laŭ la bildo, la aŭtorino estas tre interesa kaj talenta homo. Mi esperas, ke vi ne bedaŭros.

La redaktoro sin levis, etendis al Olga la manon:

— Mi deziras al vi sukceson, Olga! Estu feliĉa via unua oficvojaĝo!

Do, la unua oficvojaĝo. . . Olga sentis la saman maltrankviliĝon kiam ŝi, dekŝesjara knabino, ĵetis en poŝtkeston leteron kun la unua artikolo por gazeto. Multaj jaroj pasis de tiu tempo. Ŝi fariĝis plenaĝa: baldaŭ ŝi estos dudekdujara. Diplomita ĵurnalistino Olga Kravĉuk. Ŝi imagis, kiel de nun oni skribos ŝiajn publikaĵojn: „O. Kravĉuk baza korespondanto“. Olga ridetis: „Kia do vi estas korespondanto, kaj krome „baza“, se vi konfuziĝas kvazaŭ komencantino!“

La trajno rapide veturigis Olgan for de Kievo. La vagonadoj ritme frapadis la relojn, kvazaŭ kalkuladis la tempon. Tago, du, monato, jaro dudek, tridekjaroj... Olga imagis sin en la atmosfero de la bildo de Vdovina, kiun ŝi hieraŭ rigardis. Milito, batalo ĉe la frontlinio. Malgranda, svelta junulino elportas el la batalejo morte vunditan soldaton. La kunpremitaj dentoj en lasta fortostreĉo, flokoj de blondaj haroj kunluliĝis pro ŝvito. Kaj vizaĝo, la vizaĝo, kiun oni ne povas forgesi. Ĉio estas en ĝi: doloro kaj malĝojo,

delikateco kaj kolero. Avaraj peniktiroj, avara kologramo: nigro, ruĝo kaj grizo. La homo, pentrista tiun bildon, konis la militon, travivis ĝin. Sekve antaŭ ĉio tiu estas neĵuna homo. . .

La suno jam leviĝis sufiĉe alten, kiam Olga venis al malgranda apudstacia strateto. Du larĝaj verdostrioj zonis ĝin ambaŭflanke. La arero pleniĝis per ebriga mielaromo: floris la tilioj. La strateto kuris malsupren, kaj tie, kvazaŭ abunde elverŝita arĝento, plaŭdis rivereto. La junulino pretervole admiris tiun ĉi neordinaran belecon de la malgranda urbeto. Ŝi rememoris, ke la strato, kiun ŝi devas trovi, nomiĝas Ĉeborda. Pasanta knabo montris per la mano flanken. Olga sin direktis tien.

La domo numero 18, kie loĝis la pentristino, staris aparte de la ceteraj domoj, formantaj unu vicon. Ĝi estis malnova ŝtondomo, tegmentita per ruĝa tegolo, kun altaj, mallarĝaj fenestroj. En la duonluma koridoro la junulino haltis, serĉante sur pordoj la tabuletojn. La bezonata loĝejo estis trovita facile. Olga ordigis robon, hararanĝon kaj, aŭskultante la frenezan korbatadon, delikate frapis.

Post momento la pordo malfermiĝis. Sur la sojlo staris grize, iom kurbiĝinta virino en la aĝo de ĉirkaŭ sepdek jaroj, aŭ eĉ pli.

— Kiun vi bezonas? — ŝi demandis seke.

— Mi. . . Mi. . . — malkuraĝe balbutis Olga, — mi volus. . . vidi Tatjana Vdovina. . . Eble, vi estas tiu?

— Ne, ne mi. Kaj ĝenerale, neniu Vdovina loĝas ĉi tie.

La konversacio ŝajnis esti finita. Olga embarase rigardis la maljunulinon:

— Sed. . ., sed en la redakcio oni ne povis erari. Tie oni donis al mi tiun ĉi adreson: strato Ĉeborda, 18, loĝejo 2. Aŭ, eble, mi mistrakis?

— Ne, vi ne mistrakis. Tamen mi ripetas: ne niu Vdovina loĝas ĉi tie.

Olga jam volis pardonpeti kaj foriri, kiam en la antaŭĉambro aŭdiĝis vira voĉo:

— Kiu venis, panjo?

— Iu junulino demandas, pri Tatjana Vdovina, kiu supozeble, loĝas ĉi tie.

— Pri Tatjana Vdovina? Lasu ŝin eniri.

La maljunulino rigardis mire la filon, repaŝis flanken. Olga ekvidis altan viron kun lambastonoj. Li similis vunditan birdon, kiu starante sur unu piedo, sin apogas per la flugiloj. Lia maldekstra kruro mankis. Anstataŭ ĝi pendis malplena pantalonotubo.

— Bonan tagon. . . Mi estas el redakcio, ĵurnalistino Olga Kravĉuk. . . Mi volus vidi Tatjana Vdovina.

— Bonan tagon, bonvolu eniri la ĉambron.

Ili eniris en la vastan, modeste meblitan ĉambron.

Antaŭ ĉio la okulojn frapis bildoj, kiuj kovris ĉiujn murojn.

— Nu, ni konatiĝu, — diris la viro. Mi estas Grigorij Petroviĉ Miroŝnik. Sed bonvolu sidiĝi.

Olga estis ekstreme konfuzita. Rimarkinte tion, Miroŝnik demandis:

— Vi bezonas Tatjana Vdovina, pentristinon? Ĉu tiel?

— Jes, jes, ĝuste tiel, — haste komencis Olga. — Mi estas el Kievo, el la gazetredakcio. Mi volus paroli kun ŝi kiel kun aŭtorino de la bildo „Flegistino“.

— Tatjana Vdovina, ĝuste, ne ekzistas. Sed, se vi interesas la aŭtoro. . .

Olga nenion komprenis. Ŝi rigardis ĉi tiun ankoraŭ ne maljunan homon, kiu, verŝajne, ankoraŭ ne atingis la kvindekjaran aĝon. Lia vizaĝo memorigis per io la antikvan: iom kurba nazo, densaj brovoj, kunkreskiĝintaj, nigraj krispaj haroj, arĝentitaj per frua grizeco. Ŝi rigardis kaj neniel povis kompreni, ĉu ne ŝercas pri ŝi tiu ĉi serioza laŭaspekto homo.

— Sajnas, la bildo „Flegistino“ gajnis la unuan lokon en la ekspozicio. Mi legis pri tio en gazeto, — diris Grigorij Petroviĉ. — Sincerdirinte, mi neniam esperis tian altan takson de mia laboro. Krome mi unuafoje partoprenis la ekspozicion. Kaj Tatjana Vdovina ne estas la frukto de senbrida fantazio. Tiu vere vivis kaj vivas. . . — kaj, iom pensinte, li aldonis: — En mia koro. . .

Mi neniam malfermadis la koron, pensante: mankas la amatino — mankas feliĉo. Kaj mi, suferis, baraktis enfermiĝinte. Tutan streĉon, doloron, maltrankviliĝon elverŝis mi en la bildon. Fariĝis al mi pli facile, kiam mi rakontis per la peniko pri ŝi — mia Tanjo.

Antaŭ la milito mi studis en arta instituto, mi vidis min estonta profesia pentristo. Sed la tempo diktis siaĵon. Komenciĝis la milito, mi fariĝis artileriisto. Dum unu el la bataloj obuso trafis nian baterion. Min, senkonscian, tute sangokovritan, kun deŝirita kruro Tanjo savis. Ŝi estis moskvanino, dum paca periodo ŝi estis instruistino. Mi ne scias, per kio mi plaĉis al ŝi. Kiam mi resaniĝis iomete, ni enamiĝis reciproke. . .

En la okuloj de Grigorij Petroviĉ eklumis varma flameto. Maltrankviliĝo kaptis lin tutan, sed li jam ne povis plu rakonti.

— Oni jam intencis min ellasi, kiam venis ordono pri evakuo de la hospitalo. Tamen tion oni ne sukcesis fari, ĉar post du horoj la faŝistaj aviadiloj komencis ĝin bombi. Tanjo kuradis,

hastis. Ŝi volis elkonduki kiel eble plej multe de malsanuloj. Mi iradis jam mem, helpe de lambastonoj. Alkuris ŝi al mi, alpremiĝis: „Iru, Grigorij, mi tuj. . . Mi elkondukos ankoraŭ unu el la tria ĉambro. Tro juna li estas, estas domaĝe tian lasi“. Ŝi ekrigardis al mi en la okulojn, demandis: „Ĉu vi ne koleras?“ — „Ne, mi diris, — kuru!“ Ŝi forkuris. Kaj jam ne plu revenis. . .

La pentristo eksilentis. Granda larmo elruligis el liaj okuloj kaj fluis sur la tablon. Estis tre malfacile rekoni nun Grigorij, tiom li maljuniĝis en daŭro de tiu ĉi malgaja rakontado. Olga estis preskaŭ ploranta kaj retenadis sin, mordante la lipojn. Post kelkaj minutoj da silento li plurakontis:

— Mi ne povas forgesi ŝin. Ĝis nun mi aŭdis la teneran voĉon, vidas la okulojn, kiuj absorbis bluan ĉielabision, sentas la varmon de ŝiaj manoj. Tanjo estis instruistino. Mi anstataŭis ŝin. Ankaŭ mi instruas infanojn pentri kaj desegni. Pentras ankaŭ mi mem. Kaj subskribi la bildon per la nomo de Tanjo la konscienco ordonis.

Nun Olga komprenis ĉion. Antaŭ ĉio tiun ĉi homon. Li havas grandan koron, li scias, kio estas fideleco. Ŝi komprenis, kial la amo estas nevenkebla. Nek la militoj, nek la rigora tempo-fluo kapablas ekstermi ĝin. Olga komprenis, kial la bildo de Grigorij Petroviĉ tiel ravis la spektantojn. La pentristo superplenigis ĝin per sia granda amo, senlima tenereco. La ĵurnalistino pretis sin ĵeti al li por danke kisi lin.

La konversacio longiĝis. Olga volonte aŭskultus lin pli kaj pli, sed ŝi vidis, kian akran doloron alportas al la pentristo la rememoroj pri la perdita feliĉo. Ŝi leviĝis por adiaŭi, kvankam sentis, ke ŝi devas ankoraŭ kaj ankoraŭ foje vidi Grigorij Petroviĉ, de kiu nevideble radiis vivodona varmo.

— Mi tre dankas vin! Mi jam devas iri.

Grigorij Petroviĉ prenis la lambastonojn. En liaj okuloj ankoraŭ brulis flametoj.

— Ĉu vi permesos, ke mi venu al vi ankoraŭ morgaŭ?

Li rektiĝis, kvazaŭ aglo antaŭ ekflugo. Lia vizaĝo sereniĝis, tuj plijuniĝis:

— Venu. . . Mi atendas!

„NENIA PACO SEN TRAKTITA SOLVO“

(Interparolo kun Fakhry Farhoud — libana sindikatisto)

— Alfrontoj kaj pafĉesigoj sin sekvas en Libano ekde pluraj semajnoj. Kiu respondecas pri tiu nova ekflamo de perforto?

— Surloke respondecas la falangistoj. Ilia ĉefo Bechir Gemayel fakte planis pligrandigon de la landparto, kiun li jam kontrolas ĝis Liban-monto.

Per la forto de siaj trupoj kaj de moderna armilaro aĉetita interalie el Israelo, ĝuste li havas politikan iniciaton en la Libana fronto. Kaj ĝuste li decidis sieĝi la urbon Zahlé, kiun la sirianoj konsideras niglilo de ebenaĵo Bekaa.

Li tiamaniere celis deloki la nunan limofiksazon de la fortoj, kunligante la Libanan montaron norde tra Zahlé, al Djezzin sude, kaj al la landkrajno de majoro Saad Haddad, kontrolata fakte de Tel-Aviv. La ĉefo de Kataeb volas malpermesi al la araba malpersvada Forto kaj al la leĝaj libanaj fortoj certigi la sendependecon de Libano: evidente li celus devigi la sirianojn retiriĝi el la lando, almenaŭ krei tie situacion favoran al fremda okcidenta interveno kiel tiu proponita de Francio. Mi tiuokaze substrekas, ke la francaj iniciatoj estis malakceptitaj de ĉiuj aliaj libanaj fortoj.

— Konsiderante tion, kio okazas en suda Libano, kie la israela aviadilaro intervenis plurfo-

je, evidentiĝas, ke la falangistoj ne estas solaj en la batalo.

— Ili ja vere estas nur ilo manipulata de Tel-Aviv kaj Vaŝingtono! La israela ĉefministro Menahem Begin bezonas krei konfuzitan situacion en Libano antaŭ la venonta parlamenta israela balotado, kiun li riskas perdi profite al la laborpartio kaj al ties partiestro Shimon Péres.

Siaflanke Usono konstatas la senlirejon al kiu kondukis la akordoj de Camp David. Tiujn lastajn unuece kontraŭstaras la sirianoj, la libanaj progresemaĵoj kaj la araba rifuzfronto. Do la Blanka Domo faras ĉion por finvenki tiun baron. Estas do evidenta kunligo de interesoj inter Beĉir Gemayel, Menahem Begin kaj generalo Haig, la nuna usona ŝtat-sekretario.

Cetere, ĉiu povis noti, ke tiu nova eksplodo de perforto koincidis kun la vizito en Jerusalemo de generalo Haig komence de aprilo. La situacio ŝajnas al ni tre grava rilate al paco en la regiono, senkonsidere al tio, ke ĝi povas novfoje minaci la mondan pacon. Ĉiu devas bone mezuri la kata-

strofajn konsekvencojn, kiujn povus havi tiu alfronto, se ĝi devus pludaŭri.

— Kiamaniere laŭ vi tiu nova krizo povas esti solvita?

— Estas necese forte substreki, ke tiu batalo nenimaniere estas alfronto inter libanaj kristanoj kaj la araba malpersvada forto, t. e. la sirianoj. La konflikto oponas nome la falangistojn al la sirianoj, ĉar la unuaj provis bari la vojon Beyrout — Damasko sieĝante Zahlé-on.

Ni ja ne forgesu, ke antaŭ kvar jaroj ĝuste la libanaj kristanoj kaj notinde tiuj de Zahlé petis Sirion interveni en Libanon! Cetere, ne interne de tiuj urboj okazis la bataloj, sed ekstere, inter falangistoj kaj siriĵaj trupoj.

Fakte la krizo povas trovi solvon nur per traktado. Kaj tiu ĉi devus permesi garantion pri unueco de Libano kaj ĝian rajton al disvolviĝo ekstere de ĉia fremda interveno, kiu ajn ĝi, estus.

P. L. Séguillon

(El „Combat pour la Paix“ — Francio, majo — junio 1981)

KIU POSTVIVOS

En artikolo de 24-a de marto 1981 pri la konferenco en Vaŝingtono de kuracistoj kontraŭ la atomarmiloj sub titolo „La postvivintoj envios la mortintojn“ romkatolika gazeto „Barabants Dagblad“ skribas: „Pli kaj pli usonanoj kalkulas pri la ebleco de atommilito kaj supozas, ke oni povas ĝin pretervivi. Tio montriĝas el la eksploda sresko de la t. n. „doomsday-industry“ (industrio por la Lasta Juĝo). Pro la atomminaco dekmiloj da usonanoj preparas sin por la plej terura okazantaĵo.

La negoco pri privataj atomŝirmejoj floras kiel neniam antaŭe. Calvin Zehring, fabrikisto de „la Lasta Juĝo“ en Pensilvanio apenaŭ povas plenumi ĉiujn mendojn de en- kaj eksterlando. Malgrandan atomŝirmejon por ses personoj oni povas aĉeti por nur 9000 da dolaroj. Ĝi estas ekipita per aerfiltriloj, tapiŝoj, necesejo kaj sekigita nutraĵo por kelkaj monatoj. Ĝi estas liverata kun malgranda arsenalo da armiloj kontraŭ konkurantoj-postvivintoj!“ En granda usona magazeno Zehring en februaro rekomendis siajn atomŝirmejojn sub jena slogano: „Se vi postvivos, la mondo estos tre bela, ĉar vivos multe malpli da homoj. Ĝi (la mondo) fariĝos bela loko por tute denove komenci“!!!

Jen la kanibaloj! Ili estas eĉ pli grandaj krimuloj ol la nigra bando de Hitler iam ajn estis. Pro tiaj eldiroj kaj okazantaĵoj la rezisto cetere rapide kreskas kontraŭ la NATO-mizantropoj. Tion pruvis la hodiaŭ impona internacia demonstracio en Bruselo al la krimula konspirejo de nia samlandano, la faŝisto Jozef Lunc. En la tridekaj jaroj li membriĝis al la nederlanda faŝisma partio NSB, kiel montriĝis el dokumentoj publikigitaj de la Nederlanda Stata Instituto por

Militdokumentado. Responde je tiu ĉi malkovro de la Instituto, Luns diris, ke eble lia frato, nun loĝanta en okc. Germanio, enskribis lin kiel membron. „Mi almenaŭ neniam pagis kotizon“, Luns diris kaj ĉiu en Nederlando ekridegis, ĉar ĉiu en nia lando scias kia reakciulo li estas. En Bruselo, kie la polico klopodis erarvagigi porpacan manifestacion, oni renkontis tutan armeon da ĝisdente armitaj policistoj inkluzive multajn kirasitajn aŭtomobilojn, tutan kavalerion, ĵetilojn de tre danĝera vomiga kaj larmiga gasoj, akvoĵetilegojn kaj similajn ilojn por defendi la „pacistojn“ de NATO kontraŭ tute pacamaj, kantantaj, dancantaj kaj slogankriantaj demonstrantoj. Ni ne sukcesis atingi la NATO-stabejon, tamen delegacio estis allasita por transdoni la postulon por nestarigo de la novaj usonaj atomraketoj, por malarmado kaj por forigo de ĉiuj atomarmiloj el Eŭropo. En la manifestacio partoprenis krom belgoj miloj da nederlandanoj, francoj, italoj, danoj, svedoj, angloj kaj turkoj (la lastaj en Francio laboras kiel t. n. „gaslaboristoj“).

Similaj manifestacioj okazis ankaŭ en Germanio kaj Anglio kaj oni planis tutan serion da novaj demonstracioj i. a. en Hago kaj eĉ demonstracion, kiu komenciĝos en Kopenhago kaj finiĝos en Parizo. Tre ĝojige estas, ke en la demonstracioj, ĉiam partoprenas multege da junaj homoj, kiuj mem ne spertis militon. Ili eĉ formas la grandan plimulton de la demonstraciantoj. Kaj ekzistas multaj homoj, kiuj senlace diradas, ke la nuna junularo ne plu havas idealojn kaj nur amas la satan vivon. Ili partoprenu en tiaj demonstracioj kaj ili spertos la kontraŭon.

Ru Bosong
(Nederlandano)

PACBATALO EN 1936

En 1935 faŝisma Italio invadis Etiopion kaj konkeris ĝin (1936) laŭ rabista maniero. En la sama jaro hitlerisma Germanio per unuflanka deklaro nuligis la validecon de la Versajla Paĉkontrakto, proklamis la revenĝismen kiel sian politikon kaj komencis sin pretigi por starigo de germana mondregado. En la motivo de la kvarjara plano (1936—1939) de faŝisma Germanio estis klara difino, ke oni celas rekonstrui la germanan ekonomisistemon je militaj reloj.

La komunistaj, laboristaj kaj etburĝe demokratiaj partioj diverslandaj ekflaris alproksimiĝon de nova mondmilito. Fine de februaro 1936 okazis la VI-a Plenkunsido de la Centra Komitato de Bulgara Komunista Partio. En la unua punkto de la tagordo oni traktis la problemon pri starigo de vasta popola fronto kontraŭ la faŝismo surbaze de la proleta unuecfroto kaj estis voĉdone aprobitaj konformaj decidoj.

Pere de la amasaj organizoj Bulgara Laborista Partio trovis la vojon al la koro de la popolo, kies interesojn ĝi defendis abnegacie. Iom post iom oni trovis konvenajn formojn por publika manifestiĝo de kontraŭfaŝisma spirito inter la vastaj popolamasoj en nia lando.

Kaj jen oni iniciatis „Kampanojn kontraŭ la milito“. Unu post alia la amasaj kaj fakaj organizoj faris publikajn kunvenojn. Raportantoj per vervaj paroladoj prezentis tute klare la mutilojn kaj la perdojn pro la militoj. Sekvis viglaj diskutoj, en kiuj la ĉeestantoj kondamnis kaj la militon kaj la agresulojn. Ne estis necese detale klarigi, kiuj estas la agresuloj, ĉar oni jam konis ilin pro la agreso en Etiopio (1935—1936), per la rearmado de faŝisma Germanio kaj per la helpo al generalo Franko far ambaŭ faŝismaj landoj por komploti kontraŭ la Popolfronta Respubliko Hispanio.

La kunvenoj voĉdonis rezoluciojn kondamnantaj la militon. Tiajn rezoluciojn aprobis Bulgara Virina Asocio, Asocio de la Kristana Junularo, Asocio de Kuracistoj-Psikiatroj, la Societoj pri Sociologiaj Studoj kaj aliaj organizoj en Bulgario. La vaste kaj energie entreprenita „Kampanjo kontraŭ la milito“ estis direktita rekte kontraŭ la militema kaj uzurpema faŝismo. La akceptitaj rezolucioj bone pravas tion, ili estis samtempe brilaj akuzoj kontraŭ la esenco de la faŝismo mem.

La bulgaraj esperantistoj ne restis ekster tiu kampanjo. Unue la signalon donis la esperantistoj en Sofio. Kunveninte en sia nova propra klubejo (inaŭgurita je la 22-a de decembro 1935)

sur str. „Alabin“ n-ro 50, la 18-an de marto 1936 okaze de la 65-jara datreveno de la Pariza Komunumo (1871), ili aŭdis tre aktualan raporton pri „Esperanto kaj Paco“ far N. Dafovska. En la diskuto oni pledis per la „interna ideo de Esperanto“ por aktiva partopreno de la esperantistaro en la paĉbatalo kontraŭ la preparata milito. En la fino estis voĉdonita dokumento, per kiu la esperantistoj de Sofio deklaris sian aliĝon al la rezolucioj kontraŭ la milito, jam voĉdonitaj de la ceteraj neesperantistaj asocioj kaj societoj en nia lando.

En „Bulgara Esperantisto“, jarkolekto XVII, n-ro 7—8, de marto-aprilo 1936 aperis la kompleta teksto de la decido de tiu ĉi historia kunveno. Interalie oni legis en ĝi: „Akceptante la ĝeneralajn motivojn kontraŭ la milito, eksponitaj en ĉi supraj rezolucioj, ni akcentas, ke en la nuna momento, kiam la militdangero estas tiom granda, ke ĉiumomente la milito povus eksplodi kaj forbalai la tutan mondkulturon, ĉiu homo devas aŭdigi sian malaprobkon kontraŭ la preparo kaj efektivigo de la milito.

Ni, esperantisioj, speciale akcentas nian malkonsenton al la milito, ĉar nia agado jam de sia ekesto estas saturita de pacideo. Eĉ plie, Esperanto naskiĝis en la kapo de sia kreinto Zamenhof ne kiel memcelo, sed kiel rimedo por interproksimiĝo de la homoj diversnaciaj, kiujn ni egale taksas niaj homfratoj. Per tiu ĉi deklaro ni plenumas parteton de nia devo al Zamenhof, aŭtoro de Esperanto kaj granda paĉbatalanto, kiu ne povis elteni la grandan hombuĉadon en 1914, kaj mortis en 1917 pro koratako.

Ni apelacias al ĉiuj kulturaj, klerigaj, pacamaj k. a. organizoj kaj al la tuta socio en Bulgario kaj en la tuta mondo aliĝi al nia komuna alvoko kontraŭ la milito, sendepende de ĝiaj motivoj, kaj deklari sin por paco kaj amikeco inter ĉiuj popoloj“.

La decido de la Sofiaj esperantistoj kontraŭ la milito estas tiom klara, ke ĝi ne bezonas komenton. Ankaŭ en aliaj lokoj de nia lando la esperantistaro agadis tiudirekten, sed ne ĉie la porpacaj klopodoj sukcesis. La divido de la socio en du malamikajn frontojn reflektis ankaŭ en la Esperanto-movado. La reakciaj esperantistoj ne estis multaj, tamen ili sentis sin fortaj, ĉar apogis sin sur la oficialan regpotencon. En Varno, ekzemple, oni diskutis la problemon pri aliĝo al la kampanjo kontraŭ la milito, sed la prezidanto de la kunveno forte kontraŭstaris kaj ne bonvolis voĉdonigi la proponon kaj ĝi oficiale fiaskis.

La komenciĝinta aktiva batalado de la bulgara popolo kontraŭ la milito, por paco kaj amikeco inter la popoloj kroniĝis per la popola venko dum la revolucio en nia lando je la 9-a de septembro 1944, kiam nia popolo transiris al pli alta ŝtupo de sia disvolvo.

Canko Murgin
(Bulgario)

LINGVAJ TEMOJ

PRI GEOGRAFIAJ KUNMETITAJ NOMOJ

En Esperanto tute ne estas unueco en la maniero skribi la kunmetitajn vortojn. Sur paĝo 522 de PIV, oni trovas, ĉe „kojoto“, „Nord-Amerika specio. . .“, kaj ĉe „kokao“, „Sudamerika arbedo. . .“ Sur la sama paĝo, du manierojn skribi tute similajn vortojn!

Ĉar ne ekzistas tiurilate eĉ embrio de regulo, ĉu mi donu — nur pro informo — la regulon, kiun mi mem uzas? Temas kompreneble pri informo, ne pri leĝo, kiun doni mi ne havas aŭtoritaton.

Kiam temas pri Nordo, Sudo, Okcidento, Oriento, ĝenerale, sen precizaj geografiaj aŭ politikaj limoj, mi ne uzas kunmetitan formon. Mi uzas „Sudo de Afriko“ por nomi ĝenerale la parton de Afriko, kiu troviĝas sude de ekvatoro (Namibio, Bocvano, Zimbabveo, ktp). Se mi bezonas adjektivon, mi uzas en ĝi dividstrekon: La sudafrika faŭno, la nord-azia frostoj; la nord-eŭropa klimato estas la klimato de la Nordo de Eŭropo. Anstataŭ „la

Nordo de Afriko“, kompreneble, oni povas uzi „la norda Afriko“ („Nordo“ kun komenca majusklo, sed „norda“ kun minusklo).

Male, kiam temas pri parto de lando aŭ de kontinento kun precizaj geografiaj limoj, ĉu naturaj, ĉu politikaj, mi uzas kunmetitan formon sen dividstreko, same por la nomo kaj por la adjektivo. Sudafriko estas rasisma ŝtato troviĝanta en Sudo de Afriko. Nordkoreo kaj Orientgermanio estas socialismaj ŝtatoj. Centrafriko ne. Nordameriko estas kontinento. Meksiko estas en la Sudo de Nordameriko, kaj ekvatoro trapasas en la Nordo de Sudameriko; Fajrolando estas en la Sudo de Sudameriko. La kivio apartenas al la novzelandfaŭno (ne novzeland). La okcidentgermana politiko estas imperialisma (tiu de Okcidentgermanio). Sed, male, la okcidentgermanaj (kun dividstreko) reĵnaj pejzaĝoj estas belegaj (tiuj de okcidenta Germanio).

Jen do la regulo mia. Se vi trovas ĝin fuŝa, ne plu pensu pri ĝi. Se vi trovas ĝin uzinda, uzu ĝin, mi ne postulas aŭtorrajtojn.

André Cherpillod

Nota de la redakcio. Ni konservis la ortografion de la aŭtoro, kvankam ni ne konsentas, ke la direktojn „nordo“, „sudo“ ktp. oni devas skribi per majusklo.

„PRI LINGVO KAJ ALIAJ ARTOJ“

En n-ro 9/1980 de „Heroldo de Esperanto“ estas publikita de James F. Cool artikolo sub titolo „Pri lingvo kaj aliaj artoj“. Fakte la artikolo estas recenzo al la libro de William Auld sub la sama titolo.

En la enkonduka parolo James F. Cool skribas:

„Lastatempe mi aŭdis ĉi-tiean profesoron pri lingvolernado aserti radie, ke Esperanto, pro manko je kulturo, ne kapablas solvi la lingvoproblemon. . . Ke Esperanto ne posedas, ne povas posedi kulturon, estas verŝajne la plej ofta kaj plej grava riproĉo, kiun nuntempe faras inteigentaj neesperantistoj. Ni ĉiuj pretas rebati, sed malmultaj kapablas argumenti tiel klare, konsekvenĉe kiel Auld“.

Do, laŭ James F. Cool, oni devas rebati la riproĉon pri manko de kulturo kaj argumenti, ke Esperanto havas kulturon.

La prezentita tezo postulas komenton.

Esperanto estas lingvo. La lingvo ne estas posedanto de kulturo. La lingvo estas portanto de kulturo. La taŭgeco de Esperanto estas mezurata ne per posedo de kulturo. Se la mezurilo estas la posedaĵo, tiam en la komenco de

sia ekzisto Esperanto estis netaŭga pro la eta, kompare al la nuna, posedaĵo. La taŭgeco de Esperanto estas mezurata per la eblo porti kulturon. Al la riproĉantoj oni devas argumenti ne ke Esperanto havas kulturon, sed ke Esperanto estas taŭga porti kulturon.

La lingvo, do ankaŭ Esperanto, ne estas arto. La lingvo estas komunikilo. Nature, tiu ĉi komunikilo en la buŝo de la poeto sonas alie ol en alies buŝo. Tamen ne pro tio, ke la lingvo estas arto, sed pro tio, ke la poeto ĝin ornamas tiel, ke ĝi plenumas ne nur la funkcion de lingva komunikilo, sed ankaŭ la rolon de estetika rimedo. Ĉi tio validas pri ĉiu ilo. Eĉ la plej simpla transportilo povas plenumi ne nur transportan funkcion, sed, se konvene ornamita, ankaŭ estetikan funkcion. Sed ĉi tio ne nuligas la transportan funkcion de la ilo. Tiel ankaŭ la lingvo en la buŝo de la poeto ne ĉesas esti lingvo. Arto estas tiu plio, se estas permesita tiu simpligo, kiun la poeto aldonas al la lingvo.

Esperanto ne bezonas troan defendon. Tio, kion ĝi bezonas, estas, ke oni prezentu ĝin tia, kia ĝi estas: lingva komunikilo. Kiel lingvo ĝi povas esti kaj estas grava kultura kaj arta faktoro.

Ljubomir Miĥajlov

NIAJ LEGANTOJ SKRIBAS

Mi ricevis leteron de mia nederlanda korespondantino, en kiu ŝi interalie skribas:

„Mi havas zorgojn pro la estonteco. Laŭ intervjuo de konata usona verkisto la minacanta atombombo super niaj kapoj forviŝos tutajn landojn de la mapo.“

Kaptita de kontraŭsoveta mensogo ŝi skribas pluen. Pli bone sub la rusoj ol morti dum la atommilito. Unu konsolo ekzistas, ke ĉiuj progresaj partioj, ankaŭ nia kristana, protestas energie kontraŭ la starigon de novaj raketaj bazoj en Nederlando.“

Tamen pri la multnombraj proponoj rilate al malar-migo faritaj de Sovetio estas konate preskaŭ nenio. Oni nenion scias pri la tute samrajtaj rilatoj kaj kunlaboro de USSR ankaŭ kun kapitalismaj najbaraj landoj kiel Finnlando kaj Japanio. La okcidentaj medioj tute silentas pri tio. Ĉi tie estas vasta kampo ankaŭ por ni Esperantistoj sendi konvinkan materialon.

Kurt Heeg

INCENDIO

Feuer! Fire! Feu! Devis evakui la konstruaĵon la ĉe-estantoj en la UN-oficejo en Vieno pro supoza fajorodanĝero, meze de 1980a novembro. Laŭ informo de s-ro Eskil Svane, oni donis instrukcion por fuĝo per la laŭt-parolilo nur en germana, angla kaj franca lingvoj.

Kiel ni scias la oficialaj lingvoj de UN estas angla, arba, ĉina, franca, hispana kaj rusa. Estas memkompreneble, ke oni uzis la germanlingvon en germana urbo Vieno. Kaj supozeble la germanlingvanoj el la konstruaĵo plej rapide forkuri, ĉar ili plejunue komprenis la instrukciojn.

Homoj, kiuj pli bone komprenas araban, ĉinan, hispanan aŭ rusan esprimon pri la incendio povus esti kviete sidantaj en la oficejo. Kio do pri la hazardaj vizitantoj kiuj ne komprenas la uzatajn 3 lingvojn?

EHO DE L'milito

36 jaroj jam pasis de la dua terura mondmilito.

Dum la jaroj al la popoloj, kies teritoriojn okupis faŝistoj, la milito ofte memorigas sin, malkaŝante faŝistajn subterajn kaŝejojn de obusoj, bomboj, k. a. mortportantaj donacoj de la milito.

Certe, estis ankaŭ mortfarantaj akcidentoj, aparte dum la unuaj post militaj jaroj. Sed poste la popoloj fariĝis pli atentaj kaj la trovaĵoj estis akurate eligataj el la trovitaj kaŝejoj, eksportataj al sendanĝera loko kaj... la militaj donacoj forte resonis per sia fortega eksplodigo.

Unu el ili sin memorigis en la belorusa urbo Baranoviĉi dum varma maja tago de 1980. Proksime de fervoja stoprando, sur neuzata tereno, pacamaj konstruistoj komencis fosi por fundamento de loĝdomo. Kaj, subite trovaĵo: faŝista obuso.

Al la loko de la trovo de la municioj venis grupo de sapeistoj. Zorge esplorante la danĝeran zonan, ili trovis grandan subteran kaŝstokejon de mortportantaj obusoj. La stokejo estis minita de la faŝistoj, la partoj de obusoj estis farĉitaj per venenaĵoj.

Dum du longaj kaj danĝeraj tagoj la soldatoj elfosadis la faŝistajn donacojn. Proksimume mil obusoj estis elfositaj, kaj dekoj da tunoj da aliaj mortportantaj donacoj.

Por la plenumo de milita tasko, — likvido de la danĝera eksplodiga loko dum paca tempo, la partoprenantoj estis prezentitaj por milit-premioj.

La eĥo vole-nevole memorigas pri la danĝero de tutmonda nuklea milito, kiu alportus la pereon ne nur de nuntempa, kaj ankaŭ de estontaj generacioj.

Evito de nuklea milito — jen estas la sola eblico savi la homaron kontraŭ diabla katastrofo.

Bedaŭrinde la militarista febro per direktivo №59 de la Blanka Domo, kiu oficiale adoptis la tiel nomatan doktrinon de „limigita“ nuklea milito, pliigas la eblon ĝin komenci kaj malfaciligas la problemon bridi la akcelon de l'armado kaj proksimigas la diablan katastrofon.

Tiu ĉi akcelo de l'armado atestas ankoraŭfoje, ke la usonaj leĝdonantoj perdis la kapon kaj subvipas la haston de armado, kaj provante rompi la proceson de malstreĉiĝo, puŝas la homaron al la abismo de la katastrofo.

Ĉu vi, legantoj de „Paco“, povas trankvile atendi la pereon, nenion farante por haltigi ĝin?!

Nu, protestu, kuru, retenu la manon da la frenezuloj!

K. Istomin

Janka Kupala, *belorusa poeto*

Al nia festo
Larĝe ekmalfermu pordojn,
kara patrolar do,
kaj renkontu la Oktobron
kun plej belaj kantoj!

Nian feston ni solenas
kvankam en aŭtuno,
ĝi al niaj domoj, kampoj
lumas kiel suno.

Hej, junuloj, junulinoj,
hej, komsomolanoj,
ŝutu ilorojn, verŝu ĝojon
per plenplenaj manoj!

Antaŭ ni la estonteco
kiel suno helas,
ĉiuj tagoj niaj pli ol
la antaŭaj belas.

Ne fiaskas en la kampo
kaj uzin' laboro —
pri atingoj grandaj niaj
flugas alta gloro.

Ne per revoj ni atingas
alton de l'ĉielo, —
aerŝipoj — niaj birdoj —
flugas en sunhelo.


Ne inferon ni eltrovas
en la tera sino,
sed trezorojn ni akiras
helpe de l'maŝino.

Ho, ne timas malamikojn
nia vasta tero;
estas ni sur ĝi semantoj
de feliĉ' kaj vero.

Ne sombrigos niaj pensoj,
niaj helaj kantoj
pro l'katenoj, pro l'paŝiloj
de l'faŝistaj bandoj.

Iras ni en juna marŝo
kun la sunradioj.
Gloron al patrio vasta,
al popoloj ĝiaj.

El belorusa: **B. Berin**
(Latva SSR)



ESTIMO DE L'ETIKO AL LA VIVO

Kiam mi rememoras mian restadon en Lambarené, mi vidas la grandiozon de l'etika misio de Albert Schweitzer (Svajcer) same en teorio kiel en praktiko, do en plena harmonio. Eble plej konvinke pri tio parolas „Village de la lumiere“ — („Vilaĝo de lepruloj“). Antaŭ ol Schweitzer atingis la bordojn de Ogowe, la vivo de lepruloj estis tre kruela. Kunloĝantoj forpledis ilin el la vilaĝoj kaj el la komunumo de l'tribo. Tiuj mizeruloj poste mortis pro malsato, aŭ pro malespero. Post konstruo de malsanulejo en 1913 oni prizorgis tiujn ĉi kompatindulojn. Por Dr. Schweitzer neniuj pacientoj estis perdita, neniuj povis esti forpelita. Senĉese de tiu tempo estas antaŭ miaj okuloj malfeliĉuloj, kiuj malsanas pro lepro, kies ŝvitantaj korpoj brilas kiel nigra polurita ligno. Ĝis nun mi vidas iliajn okulojn, kiel ili kun mieno de nedirebla angoro alrigardas la alvenantojn. Iliaj manoj kaj kruroj estas plenaj de ulceroj, fojfoje kun restintaj nuraj stumpoj. Albert Schweitzer ne limigis sian flegadon je ĉiutaga hospitaligado de la pacientoj. Li konsekvence strebis forigi la kialojn de ilia sufero. Tial ĉiu paciento ricevis sur siajn piedojn specialajn ŝuojn tial li fondis grandan bienon, kie ili kulturis por si mem el kernoj panarbojn, mangojn, bananarbojn, palmojn, citrusarbojn, por havi manĝaĵon ĝis sia vivofino. Sian kuracetikon li aplikis per speciala maniero. Li parolis kun siaj pacientoj, li kvazaŭ estus travivanta iliajn sortojn, iliajn dolorojn, luktojn kaj batalojn por savo de la korpo kaj de la animo. Multaj specialistoj el malproksimaj landoj alvenadis por vidi tiun ĉi terapion, kiu similas al terapio en psikiatrio. Fame konata doktoro Ferguson konstatis, ke „en Lambarené oni kuracas per amo“ — kaj tio estis esprimo de unusola etika principo de Dr. Schweitzer. La pacientoj, kiuj alvenadis la malsanulejon, pagis neniujn kotizojn, sed post la sanigo ili devis helpi al novalvenantoj. Samtempe iliaj infanoj vizitis lernejon kie Dr. Schweitzer instruis elementarajn konojn de skribado, legado, eĉ fremdajn lingvojn.

Por kiom da malfeliĉaj geedzoj kaj geamantoj la „granda Doktoro“ montris la ĝustan vojon, sur kiu ili povis venki la internan krizon. Kiofoje li forigis eĉ venĝon kaj krimon. Ĉar la „sanguvenĝo“ estis tute normala takto inter triboj de Afriko. Ofte alvenis al la malsanulejo pacientoj venenitaj per nekonataj venenoj.

Serĉado kaj trovo de l'kuracetiko en la ekvadora ĝangalo estis por la indiĝena loĝantaro tute nekomprenebla afero. La negroj, kiuj sentas sensive kio kuŝas en esenco de la homo, alvenadis al Dr. Schweitzer el malproksimaj lokoj de la ĝangalo. Ili petis helpon rilate sian doloron kaj su-

feron. Kvankam ili estis el diversaj triboj, ili konatiĝis reciproke kaj estigis novajn kontaktojn. Ili akceptis la etikan leĝon de l'malsanulejo, vivis sen malamo, sen timo, helpis sin reciproke. Kaj la saman rilaton, kiel inter si, ili havis ankaŭ al bestoj.

Schweitzer laboris tutan vivon, nepriatentante la proprajn aferojn. Kaj ĉiuj liaj kunlaborantoj-kuracistoj, flegistinoj, faris la samon. Li kreis humanan verkon de unika valoro, kaj tio restis ĝis nun, jam en nova hospitalo en Lambarené. Dek kvin jarojn post la morto de l'granda doktoro oni kuracas tie ĉi samajn malsanojn kun la sama etiko, kiel en la komenco de nia jarcento.

Okaze de la 105-a datreveno de la naskiĝo de A. Schweitzer — la granda humanisto de la moderna epoko, ni, kiuj havis la feliĉon konatiĝi kun li en la malsanulejo Lambarené, aŭ dum liaj vojaĝoj tra Eŭropo, povas diri: ni trovis efektiva la etikan idealon de ĉi tiu granda kuracisto.

Esperantigis inĝ. M. Turkova

korespondemuloj

USSR

Perikov, Valeriy, 18 j. — kun samaĝuloj el ĉ. 1., ĉ. t. — 652870 Komerovskaja obl. Mejdureĉensk, pr. 50 let komsomola d. 4, kv. 27

Žiaunys Gintaras, str. Žemaitijos 9—25, u. Mažeikiai 235500, LITOVIO

Samohvalov Jurij, str. Bogatkov 193, loĝ. 6, 630017 Novosibirsk — 22 j. ĉl. pri foto, muziko, arto, literaturo, turismo, interŝ. foto-gazetojn gr. diskojn, recipr. gastadon

Kosenjkij Ivan (35 j. amatora inventisto), str. Seĉenova 17—46

Sviridov Vladimir (40 j.), str. Vinodela Jegorova 38, Massandra.

Urbanskaja Tatjana (25 j. fraŭlino, ekonomiistino), per Slobodskoj 4, Alpuka.

Urbanoviĉ Jelena (20 j. fraŭlino, muzikistino), str. Moskovskaja 40—33

Utkina Tatjana (26 j. fraŭlino, instruistino de kuraca gimnazio interesigas pri alpismo, speleologio, turismo), str. Seĉenova 33—7

Geedzoj: Devjatovskij Nikolaj (31 j. muzikisto) kaj Devjatovskaja Svetlana (24 j. grupgvidanto), sanatorij „Sosnjak“ 23

Novosjlov Aleksej (15 j. lernanto), str. Kirova 26—17 Kuznecova Olja (13 j. lernantino), str. Puškina 27—12.

Lavrentjeva Margarita (18 j. studentino), str. Krupskoj 16

Gulevskaja Svetlana (22 j. fraŭlino, apotekstino), str. Dzerĵinskigo 7—35.

Maksimova Tatjana (26 j. fraŭlino, instruistino de geografio), str. 40 Let Oktjabrja 7—14

Eksterlandaj esperantistoj vizitontaj la faman ripozlokon en Sovetunio — urbon Jalta (en Krimea Duoninsulo ĉe Nirga Maro), bonvolu viziti E-klubon „Tero“ (Turista E-rondo). La klubejo situas en la centro de la urbo en la montara klubo (strato Gogolja 14).

Regulaj kunvenoj okazas lunde kaj vendrede ekde 19-a horo. En aliaj tagoj kontaktigu kun la klubanoj per telefonoj hejmaj: 32-92-78

REDAKTA KOMITATO

Violin Oljanov — ĉefredaktoro (Bulgario)
Nikola Aleksiev (Bulgario)
D-ro Detlev Blanke (GDR)
André Cherpillod (Francio)
William Gilbert (Francio)
Oldrich Knichal (ĈSSR)
Kimiaki Kurita (Japanio)
Nguyen Hac Trung (Vjetnamio)
Boleslav Staszczak (Pollando)

Lingvizio: **Asen Grigorov** (Bulgario)
Arta redaktoro: **Kiril Drajev** (Bulgario)
Korektis: **Minko Ĉonkovski** (Bulgario)

La Redakcio atendas kontribuadojn de pacamikoj el la tuta mondo. Ju pli da kuneaborantoj, des pli varia kaj interesa revuo. Pro la nesufiĉa spaco la materialoj ne estu pli longaj ol 60 tajpitajn liniojn, nur en gravaj kazoj — ĝis 90. Ili estu prefere tajpitaj aŭ tre klare mane skribita, kun sufiĉa interlinia spaco kaj margeno, sur grandaj folioj de kancelaria formato. La Redakcio akceptas nur originalan (unu)ekzempleron de la tajpaĵo. Kopioj estas lasataj sen konsidero. Skribu klare viajn nomojn kaj adresojn en nacia lingvo! La Redakcio ne resendas neuzitajn materialojn.

KIEN SKRIBI.

Honora Prezidanto: Nikola Aleksiev, str. Nezabravka 1, vĥod 2, 1113 SOFIA, Bulgario.

Prezidanto: D-ro Pethes Imre, H-1940, BUDAPEST VI, Nepskőztársaság utja 73, Hungario.

Vicprezidantoj: D-ro Magomet Isaev, pros. Kalinina 14, MOSKVA K-9, USSR

Glady Claude, 36 Marne str. B-1030 BRUSSEL, Belgio.

Generala sekretario: William Gilbert, 30 rue Croix-Montoire, 37100 TOURS, Francio

Sekretarioj: Syozi Nanba, Huruiti 3-13-26, Zyōto-ku, OSAKA, Japanio.

Inĝ. Angel Todorov, bulv. Emil Markov, bl. 37, II, 1404 SOFIA, Bulgario.

Ĉefredaktoro: Violin Oljanov, kv. Emil Markov, P. K. 66, 1404, SOFIA, Bulgario

Centra administranto: Vasja Petrova, Bulgara MEM-Komitato, bulv. Hristo Botev 97, 1303 SOFIA, Bulgario.

Centra kasisto: (Por la okcidentaj landoj) Pierre Jouvin, 14 rue Thiers, 76120 GRAND QUEVILLY, Francio. (Poŝtkonto CCR — ROUEN, 102-45: P)

Respondeculo pri landaj numeroj de „PACO“: Helmut Fuchs, Hohe Str. 33, DR-83, PIRNA, GDR.

KIE ABONI?

Aŭstralio: N. A. Collier, 7 Monomeeth St. BUDERIM, Qld. 4556.

Aŭstrio: Ernesto Quiotensky, Pappenheimgasse 70/3/12 A-1200 WIEN Aŭs. 100.

Belgio: Glady Claude, 36 Marne Str, 1030 BRUSSEL.

Britio: Paul Hewitt, Laycroft, Main Road, COVENHAM Louth, Lincs, LN11, OPF £ 4

Bulgario: Bulgara MEM-KOMITATO, bulv. Hristo Botev 97, 1303 SOFIA 3 levoj

Ĉeĥoslovakio: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, MEM-Sekcio, Jilska 10, 11000 PRAHA 1 30 kronoj

Danlando: Egon Starup, Brovaenget 26, DK-2700 KOBENHAVN BRH. 35 d. kr

F. R. Germanio: Roland H. Hegen, Iggelbach, Schlossgasse 30, D-6731 ELMSTEIN 20 DM.

Finnlando: Erkki Järvinen, Ukonkivenpolku 2-1-68, 01610 VANTAA 61 30 fin. m.

Francio: Roger Degrelle, B. P. 23, F-54510 Tomblaine (771.77 R. Nancy — poŝtĉekkonto) 40 fr. fr.

Germana Demokratia Respubliko: Centra Laborrondo Esperanto en la Kulturligo de GDR, Charlottenstr. 60, 108 BERLIN 30 DM

Hispanio: Luis Serrano Perez, Font Nova 32, SABADELL (Barcelona) 750 pesetoj

Hungario: Hungara MEM-KOMITATO, H-1368 BUDAPEST 5, pf. 193 36 forintoj

Italio: Riccardo Pinori, V, le Ghisleri 9/15, I-00176 ROMA (p. ĝ. k. 64882004).

Japanio: Kurita Kimiaki, 411 Misima, Yata Sakuragaoka 1209-98 (Japana Pacdefenda Esperantista Asocio).

Kubo: Rufino López, Havana Esp.- Rondo, Poŝtkesto 314, HABANA 1

Norvegio: Olaf Reiersol, Buerstan, N-3155 TOROD

Pollando: RUCH — WARSZAWA.

Portugalio: Portugala E-Asocio, Rua Dr. Joao Couto 6 R/C A-LISBOA 350 eskudo

Rumanio: Cosma Dorin, Muzicescu 26, sc. C, ap. 11, R-1900 TIMISOARA.

Socialisma Respubliko Vjetnamio: Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, 107 Quan Thanh, HANOJ.

Sovetunio: Uniĝo de sovetaj societoj pri amikecaj kaj kulturaj rilatoj kun aliaj landoj, prosp. Kalinina 14, MOSKVA K-9 1,80 rubloj.

Usono: Bern Wheel, 834, Wenonah Ave, Oak Park, IL 60 304 dol. 6,50

Aliaj landoj: Bv. turni vin al unu el la ĉi-supraj adresoj aŭ al Pierre Jouvin (centra kasisto — vd. maldekstre).

GRAVE!

Abonpagojn el socialismaj landoj sendu al 1303 SOFIA, bulv. Hristo Botev 97 (por „Paco“). El nesocialismaj landoj — al la adreso de la Centra kasisto — 40 fr. fr.